

# ĈEA 1999-2002

(el la parolado de la prezidantino)

En Tábor estis elektitaj 7-membra komitato kaj 3-membra kontrolgrupo. Ĉiuj funkcioj estas honoraj (ne salajrataj). Post unu jaro la prezidanto de la kontrolgrupo rezignis, la alia membrino eĉ ne komencis labori pro familiaj motivoj, sekve Josef Hron restis sola, ĉar la tiama statuto ne ebligis kooptadon al la kontrolgrupo. La komitato rekomendis s-ron Josef Mendl kiel kunlaboranton kaj nun dankas pro lia helpo.

Je sia funkcio rezignis ankaŭ la asocia sekretariino kaj kontistino Květa Krajíčková, anstataŭ kiu estis kooptita Pavel Polnický. La komitato kunvenis 16-foje laŭplane kaj 2-foje eksterordinare. La kunvenoj okazis en loĝejoj de la komitatanoj, nur antaŭ konferencoj en la konferencejo. Kiel gastoj estis regule invitataj la prezidanto de la kontrol-grupo, la redaktoro de Starto, la estro de Libroservo kaj la prezidantino de la pedagogia sekcio, neregule ankaŭ aliaj personoj laŭ bezono. Preskaŭ ĉiuj komitatanoj estis rete atingeblaj. Por rete atingeblaj asocioj la komitato dissendas "ret-komunikojn" (redaktas Petro Chrdle).

La programo de la komitataj kunvenoj unue kontrolis plenumadon de la antaŭaj taskoj, poste okupiĝis pri la asocia ekonomio, pri laboro de sekcioj, komisionoj kaj kluboj, pri kunlaboro kun aliaj asocioj, pri asocia organo Starto kaj Libroservo, preparis konferencojn, dediĉis atenton al instruado kaj disvolviĝo de la movado kun helpo de komputila tekniko, kio fine respeguliĝis en la nova statuto.

La ĉefdelegiton de UEA por Ĉeĥio Stanislava Chrdlová prenis de ni insida malsano kaj ŝiajn devojn transprenis Lucie Karešová. Plie Lucie prilaboris Aktualan gvidilon de ĈEA kaj novan version de la statuto.

En la pasintjara septembro la komitato turnis sin al la dumvivaj membroj kun peto pri financa helpo, kaj kolektiĝis pli ol 40 000 Kč, pro kio ni dankas (same al tiuj, kiuj subtenas la asocion per donacoj ĉe aliaj okazoj). Ankaŭ la kupona privatigo helpas al la asocio akiradi certajn financajn rimedojn. Grave la asocion subtenas la firmao KAVA-PECH, kiu financis ekz. kunvenon de asociaj reprezentantoj el mez-eŭropaj landoj en Dobřichovice aŭ renkonton kun H. Tonkin en Prago, helpis ankaŭ mon-kontribuoj el IKUE-kongreso en Kroměříž kaj OSIEK-konferenco en Strážnice.

Inter la asociaj kongresoj realiĝis du asociaj konferencoj, nome en Znojmo 2000 (86 personoj) kaj en Poděbrady 2001 (85 personoj). Niaj reprezentantoj partoprenis ĉiujarajn konsiliĝojn de mezeŭropaj E-asocioj

en Zagrebo 2000, en Dobřichovice 2001 kaj Rijeka 2002. Du niaj reprezentantoj ĉeestis HEA-kongreson en Budapeŝto kaj unu GEA-kongreson.

Malgraŭ alparolo de la iamaj asocioj ni ne sukcesis kreskigi la membrobazon, ĉesis eĉ labori la junulara sekcio, ĉar la gvidantoj iĝis plenkreskaj kaj novaj ne venas.

Por informi pri la asocio aperis *Aktuální průvodce ČES*, kiu estos ĝisdatigita post la kongreso. Dank' al komitatano Jindřich Ondráček estis trovita nova deponejo por Libro-servo en Praha-Běchovice, kien estis transportita ankaŭ la asocia biblioteko (la regularo de pruntado en aparta artikolo). KAVA-PECH prizorgis presadon de *La Nova PIV*, eldonita de SAT.

Akorde kun la kongresa rezolucio el Tábor estis fondita sekcio de informadiko kun provizora prezidanto Josef Vojáček, kiu sukcesis ankaŭ establi E-kurson ĉe universitato Masaryk en Brno kaj akiri financan subtenon por la projekto. Sekciano Miroslav Malovec arkivigas E-literaturon en elektronika formo kaj kontribuas al la reta enciklopedio Vikipedio, sekciano Josef Hron laboras pri nova granda vortaro.

Pedagogia sekcio organizis paroligajn kursojn en Dobřichovice (30 personoj), Česká Třebová (17), Olomouc (20), Poděbrady (14). La planita ĉijara decembra kurso estis ŝovita al februaro 2003. En Česká Třebová dum la kurso efektiviĝis ankaŭ la asociaj ekzamenoj "pri lingvoscio" (kvar kandidatoj, ekzamenis Josef Cink, Zdeněk Hršel, Miroslav Malovec). La korespondaj kursoj malgraŭ reklamo en la interreto ne alportis atendatan rezulton (2000 - 20 pers.; 2001 - 9 pers.; 2002 - 5 pers.; instruis D. Kočvara, A. Klementová, M. Tomečková). Infanrondetoj ekzistas en Česká Třebová, Okříšky, Praha, Ratíškovice. J. Melichárková kun M. Tomečková preparas ilustritan lernolibron por infanoj.

La katolika sekcio organizas somerajn tendarojn kaj renkontojn, ekskursojn eksterlanden, eldonas gazeton DIO BENU, kies elektronika versio disponiĝas en la interreto (grava ĉefe por nevidantoj). La kulmino estis ĉijara 55-a IKUE-kongreso en Kroměříž (167 personoj el 11 landoj). La sekcio planas bus-ekskurson al la 16-a ekumena kongreso (30.8.-6.9.2003 Rimini, Italio). Ankaŭ la manlibroj kaj flugfolioj de la sekcio estas tre altkvalitaj.

La fervojista sekcio organizis kunlabore kun KAVA-PECH neforgeseblan IFEF-kongreson en Tábor kaj konferencon en Česká Lípa.

La blindula sekcio eldonas por siaj membroj la gazeton Aŭroro, organizas kursojn, prilaboras ankaŭ Starton kaj aliajn tekstojn aperantajn

en elektronika versio.

KELI-sekcio aranĝis sian kongreson en Janské Lázně kaj preparas novan en Bystřice (2004).

La sekcio de kolektantoj ĉesigis sian agadon, la ceteraj sekcioj ne raportis.

Ni havas unu daŭran komisionon, nome pri informado kaj gazetaro, kiun gvidas D. Kočvara (kolektas ĉefe eltondaĵojn el gazetaro pri Esperanto), la aliaj komisionoj estas nomumataj nur okaze kaj por certa tempo.

La plej gravaj estas niaj kluboj. Kelkaj raportis pri sia agado (ekz. Přerov, Ostrava, Poruba, Havířov, Most, Olomouc, Brno, Mladá Boleslav, Česká Třebová, Svitavy, Prostějov, Znojmo, Třebíč, Plzeň), aliaj silentas. Multaj kluboj festis signifajn jubileojn: Brno 100 jaroj, Poděbrady 90 j., Olomouc 90 j., Česká Třebová 40 j., Znojmo 45 j., LET Lančov (Třebíč) 50 j. En Znojmo kaj Poruba estis plantitaj Esperanto-arboj (en Znojmo antaŭ la Domo de Infanoj kaj Junularo, en Poruba en parko antaŭ la gimnazio Olga Havlová).

La tradiciaj Silvestro-tagoj en Česká Třebová estas konataj ankaŭ en eksterlando, simile kiel la Internaciaj Kulturaj Festivaloj kaj Ĉeĥaj-Saksaj Tagoj en Ústí nad Labem aŭ renkontoj sur la monto Čantoryja. Regule okazas "Adonido" en Ratíškovice, renkontoj en Šumperk, Svitavy, Přerov, Prostějov, Polička, Lanškroun, Pardubice (Esperanto-tago).

EK Znojmo aranĝis ekspozicion pri Esperanto en la loka arkivo por la publiko, kie ĝi restis pli ol unu jaron. Ekspozicioj aperis ankaŭ en Vyškov kaj Pardubice. En muzeo de Sušice kaj muzeo Komenio Přerov oni proponas esperantlingvan tekston. Faldfolio aperis pri Česká Třebová. EK Most sukcesis esperantigi la oficialajn interretajn paĝojn de sia urbo. En Strážnice okazis OSIEK-konferenco 2001 dediĉita al Karolo Piĉ. La OSIEK-premion akiris Eli Urbanová pro la romano Hetajro dancas (eldonis Fonto en Brazilo).

Kvindekjariĝon festis Someraj Esperanto-Tendaroj en Lančov, organizataj de EK Třebíč. La ĉefa merito apartenas al Pavel Sittauer. La festo okazis surloke en aŭgusto tuj antaŭ la inundoj.

Male tute nova aranĝo estas en Plasy.

KAVA-PECH organizas Eko-turismajn tagojn en Šumava, biciklistan renkontiĝon IBIRE kaj plej gravaj estas kolokvioj pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST 2000, KAEST 2002).

Bona estas ankaŭ nia kunlaboro kun AEH.

Por la venonta funkcia periodo estas preparataj jenaj aranĝoj:

- Komuna konferenco kun GEA en 2003 aŭ 2004
- 15-a internacia OSIEK-konferenco (aranĝas KAVA-PECH 19.-25.7. en Prago sub titolo "Intimaj temoj en la Esperanta beletro")
- Kunlaboro kun muzeo Karel Čapek kaj Olga Scheinpflugová en Strž apud Dobříš ĉe ekspozicio de fremdlingvaj tradukoj de Čapek (do ankaŭ en Esperanto) - 2003 (Margit Turková)
- Paroligaj kursoj, - la aŭtuna kun kurso por francaj fervojistoj.

Fine mi volas gratuli al la pragaj esperantistoj okaze de 100-jariĝo de ilia klubo kaj danki al la asociaj funkciuloj pro ilia trijara laboro.

*Věra Podhradská*

*Starto 4/2202*